

NIA VOĈO

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4°.28012 Madrid
(91) 530 87 98 persone lunde, vesperè
aliaj tagoj aŭtomata respondo

Redaktas kaj eraras Lupe Sánz

SEPTEMBRO-OKTOBRO 1996

POST LONGA MALSANO FORPISIS ADA SIKORSKA

MEL kondolencas samideanon Gian Carlo Fighiera pro la perdo se sia edzino, Ada Fighiera Sikorska. Kiel geesperantistoj, geedzoj Fighiera transformis profunde la movadon en nia lando, ĉefe en Madrido, urbo kiu havis la honoron ilin gastigi dum 9 jaroj. Ili organizis la porolatan gazeton, sugestis multajn plibonaĵojn rilate esperantaj kongresojn, invitis al Madrido al prestiĝaj geesperantistoj kun diversaj motivoj (Simpozio pri sporto, nacia kongreso 1987 kun partopreno de ilia gasto W. Auld, ktp); ili estis ĵuĝantoj de literaturaj konkursoj; ili traslokigis la redaktejo de "Heroldo" al Madrido, partoprenis en la redaktado de "Datos acerca del movimiento esperantista en España: 1887-1987" kaj la 1993 reeldono, bazo de la atingo de publika utilico por HEF, kaj tiel plu

Ada, ekzemplo de esperanta entuziasmo, estis la redaktorino de "HdE", daŭrigante la laboron de sia majstro, Teo Jung. Hispana Esperanto Muzeo kaj HEF honorigis ŝin per la medalo Klara Silbernik. La laboro de Ada kiel publika rilato de la esperanta movado (bankedoj, fotoj, artikoloj, programoj de radio, specialaj kongres-numeroj de HdE dum UK, ktp), ŝia pozitiva sinteno fronte al la malfaciloj de la vivo kaj ŝia ekzempla kaj digna lukto kontraŭ la malsano mirigas kaj emociigas eĉ al la bonaj amikoj, kiuj konas sian feran volon. La ekzemplo de Gian Carlo kaj Ada plu restos ĉe la koro de ĉiu MEL-ano. Pace ŝi ripuzu.

KURSOJ

Post la sukceso de la baza kurso gvidata de Luis Ojer ĝis junio, la profesoro havas novan projekton ĉe CNT por tiu-ĉi kurs-periodo. Dum Aŭgusto li estis invitita de "Colectividad Los Arenalejos" en Alozaina (Málaga). Ĝi havas vastecon je 14 Ha, kun pli ol 700 olivarboj kaj fruktoĝardenoj. La domo estas loĝata de du familioj kun kvin infanoj. Tie ankaŭ restadas dum kelkaj tagnoktoj, je printempo kaj somero, pli ol 30 eksterlandanoj kiuj vizitis ilin. Ojer organizis du bazajn kursojn, unu el ili por infanoj 7-8 jaraj kiuj profitis la lecionoj. La daŭrigado de tiuj kursoj estas planata pere de la koresponda metodo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo.

ESPERANTO ĴURNALE

En intervjuo farita al José M^a Gironella, aŭtoro de la verko "Un millón de muertos", (EL MUNDO 96-07-14), diras ke sia patro konis Esperanton

UK PRAGO



81-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
20-27 julio 1996
Prago, Ĉeĥa Respubliko

Angelita Sanz voĝajis al Prago kun la karavano organizita de Valencia E-Grupo, ankaŭ iris César Mosteyrín kaj du gelernantoj de Valladolid.

Resumo: Representanto de UNESKO ĉeestis la inaŭguron. Je la nomo de Hispanio salutis Rafaela Urueña. Luis Hernández partoprenis en la kunvenoj de landaj komisionoj. Interesa programo de ekskursoj al ĉirkaŭaĵoj de Prago. Belega "Nacia Vespero", ktp.

Aparta mencio meritas, kiel novaĵo en UK, labor-

kunvenoj kun fakuloj ne esperantistoj, membroj de internaciaj organizaĵoj (oni uzis esperanton, anglan kaj francan), R. Urueña partoprenis en la sesio pri Internacia Juro.

La kongreso finiĝis kun la aprobo de "Praga deklaro" kiu klarigas la celojn de la esperanta movado.

NOVA PRAAVO

Gratulon al nia samideano José Francisco Platas, kiu, ekde Julio, estas pra-avo. Kiel vi scias, nia amiko Platas estis fama funambulisto kaj ludis en la plej prestiĝaj cirkoj de la mondo sub la artista nomo "Volatín". Inter liaj plej famaj numeroj sur la ferdrato, li interpretis rolon de ebriulo. Ankaŭ li inventis la spadan duelon, kaj trejnigis novajn generaciojn de funambulistoj.

EKSTERLANDE

Responde al peticio de Portugala E-Asocio, farita en 1993, la kabinetestro de la edukministro, garantias la akcepton de mezlerneja E-instruado tie kie ekzistas preta instruisto kaj interesata lernantaro. La mesaĝo estis klara: *prezentu al ni konkretan proponon kaj vi havos oficialan E-instruadon!. Defiu nin!*

HEF KONGRESO EN MURCIO (Informas Luis Ojer)

De Madrido partoprenis 4 personojn: Ana Manero, M. Parra, Luis Ojer kaj unu el lia lernantoj. La nombro de partoprenantoj ne estis granda ĉar okazis samtempe UK en Prago. Ojer sendis jenan kronikon (li ĉeestis nur dum semajfino: *La kongreso estis organizita de la Asocio Ĉielarko kun sidejo en Alquerias (Murcio), la Prezidanto de Loka Kongresa Komitato estis Miguel Muñoz Garré. La kongresejo estis la Instituto "Licenciado Francisco Cascales" en Murcia. La nombro de partoprenantoj, laŭ la kongres-libro, estis 47, la plej parto de Katalunio, Valencio kaj Murcia. Ankaŭ partoprenis eksterlandano el Perpignano (Francio). La prelegoj ne sekvis la programon, sed ĝenerale estis akcepteblaj. Kelkaj el ili okazis hispan-lingve, akorde kun voĉdonado farita de la HEF-Prezidanto, preskaŭ ĉiuj preferis ke, en viontaj kongresoj la programero okazu prefere en esperanto.*

Oni festis la vesperojn per la muziko de "Solo", kaj poezio kaj kanto de la murcianino Inma Martín kiu kantis en esperanto. Ankaŭ okazis murcia-folklora festo kun tipaj manĝaĵoj.

La Ĝenerala Asembleo de HEF farigis en Alquerias, je la entrepreno "Scorpius" kiu organizos grandan beletran konkurson dum la sekvontaj jaroj. La ekskurso okazis tra la Malgranda Maro.

HEF ANGULO

Resumo de la protokolo de la ĝenerala Asembleo: La **kotizoj** restos same dum 1997. Fundación Esperanto ricevis **heredaĵon** de gesinjoroj Casanova- Ferrandis sumanta ĉirkaŭ 3,5 milionoj de pesetoj. Julio Tarín gvidos la hispanan sekcion de **ILEI**. Rilate la ekzamenojn celas ke estonte la ILEI-diplomoj havu apogon de oficialaj institucioj. Agado de **europarlamentanoj**: Fernández Albor diris al A. Alonso ke li preferas apogi difinitajn taskojn aŭ projektojn kaj ne paroli pri ĝenerala apogo al la lingvo Esperanto. L. Serrano rakontis sian negativan sperton rilate al kataluna parlamentano Antonio Gutiérrez Díaz. **Vortaro De Diego**: Jam enkomputiligita la granda vortaro español-esperantio, nun sekvos plurjara reviziado (kvinmembra teamo) kaj poste, se oni trovos financajn rimedojn, okazos eldonadon. **Dusenca poŝvortaro**: La estraro decidis antaŭmendi ekzemplerojn (200.000 ESP) de la vortaro prilaborata kaj eldonota de M.G. Adúriz. **UZO de la aliaj lingvoj dum la kongreso kaj en "Boletín"**: Okazos referendumo inter HEF-anoj kun la demando "ĉu la kongresaj programeroj okazu principe nur en Esperanto, escepte kiam la programo indikos alion, okaze de aktoj celitaj al ekstera publiko?". Rilate hispanaj paĝoj en Boletín devas okazi debatoj ĉe HEF-Estraro. **Prezidanto**: A. Alonso ne kandidatiĝos por la venontan jaron.

HISPANIO

TV3 de **Katalunio** informis dum 9 minutojn pri la helpoprogramo de Kataluna Esperanto Asocio al Bosnio. Ĵurnalistino vizitis Liceon petante informojn pri esperanto. Ŝi redaktas artikolojn pro EFE-agentejo. En **Valladolid** okazis TV-spaco pri esperanto, estis intervjuita, inter aliaj, Pedro Garrote. Augusto Casquero, kunordiganto de E-grupoj ĉe HEF, piediria parton de la "**Camino de Santiago**", ekde León ĝis la apostola katedralo. Li elspezis 9 tagoj en la spiritala ekskurso.

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ĉiu-lunde ni kunvenas, ekde la 18,30 horo, ĉe MEL, Atocha 98-4°

Marde kaj jaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3°-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

Kursoj:

Baza kurso: Sidejo de "Juventudes libertarias". C/ Magdalena 29, 2° Izda.

Centro Cultural C/ Maestro Alonso 6 (Ventas)

Prelegoj dum venontaj monatoj, ĉe MEL je la 19,00 horo.

Septembro "Esperanto, lengua internacional". L. Ojer. C/ Magdalena 29, 2° Izda.

7an Oktobro "Someraĵoj esperanto-kongresoj". Parolrondo de partoprenantoj.

14an Oktobro "Urboj de la austro-hungara imperio". C. Suárez

ESPERANTO LICEO DE MADRID

Atocha 98-4°

28012 Madrid

Asociación de Utilidad Pública Municipal

Ada: redaktorino de "Heroldo"

Ada Fighiera-Sikorska naskiĝis en Siedlce (Pollan-



do) la 26-an de januaro 1929, vivis kaj studis en Varsovio ĝis la milit-eksplodo, en 1939, kiam la lando estis atakata samtempe de la tiama Germanio kaj Sovetunio. Tiam, la familio fuĝis al Llovo (orienta Pollando), kiun la patro, generalo Korski, havis la taskon dedi. Post la kapitulaco de Pollando, la familio kun la pola civila loĝantaro estis internigita en Siberio, kie Ada vizitis rusan bazan lernejon: la patro, kune kun 10 000 aliaj polaj oficiroj estis murdita de la ruĝa armeo en la arbaro de Kattyn (Pollando).

Danke al interkonsento kun Britujo, en 1941 Sovetunio liberigis la 2 milionojn da polaj internigitaj civiluloj, kaj en 1942 Ada kun la patrino kaj la fratino rajtis veturi tra Samarkando al Persio, unue al Teherano, poste al Isfahano, kie ŝi vizitadis polajn lernejojn ĉe la lokaj polaj setlejoj. Inter 1945 kaj januaro 1948 ŝi loĝis kun aliaj polaj rifuĝintoj en Libano, Beiruto; samjare ŝi plenumis kun siaj samklasanoj polan maturec-ekzamenon Britio kaj novembro ŝi revenis al Pollando post okjara foresto.

Fininte la fakultaton pri slavistiko kaj specialiginte pri ĵurnalismo en la Universitato de Varsovio, Ada eklaboris ĉe eldonejo. En 1956, Julio Baghy gvidis kursojn en Varsovio kaj Ada estis ŝia fervora lernantino. Tiam komenciĝis ŝia amo al Esperanto, kiu daŭris la tutan vivon.

En 1958, antaŭ la jubilea UK en Varsovio, ŝi estis vicprezidantino de la Varsovia E-societo kaj kunfondis la Esperanto-redakcion de la pola radio: tiam ŝi konis en la pola ĉefurbo sian estontan edzon, kiu kiel KKS loĝis konstante en la kongres-urbo por prepari la UK. En 1960 ŝi edziniĝis al G.C. Fighiera en Bruselo kaj la postan jaron kunlaboris kun li en la organizo de la UK en Harrogate (Britio). La geedzoj interparolis nur en Esperanto dum 38-jara geedza vivo.

En 1962 Ada transprenis de Teo Jung la gazeton "Heroldo de Esperanto", kiun ŝi redaktis ĝis sia forpaso dum 36 jaroj: unue, dum 17 jaroj en Bruselo, poste, dum 9 jaroj en Madrido, fine, ek de 1988, en Torino.

Ada Fighiera-Sikorska partoprenis en grandega kvanto da internaciaj, naciaj kaj lokaj kongresoj kaj kunvenoj, ĉie aktivis, instruis kaj prelegis. Ŝi estis membro i.a. de TEJA, EVA, Monda Turismo, Esperanta PEN-KLUBO kaj honora membro de UEA. La Internacia PEN-Klubo ĵus akceptis inkluzivi ŝin en la liston de la meritaj anoj, pri kiuj la PEN-Mondkongreso funebros en Meksiko.

Ŝia lasta mesaĝo el la malsanulejo

Unu semajnon antaŭ sia forpaso, Ada manskribis en sia malsanuleja lito la suban tekston por "Heroldo", kiu montras ŝian optimismon pri resaniĝo kaj daŭra interesiĝo pri la gazeto:

"Internacia ĉeno de solidareco"

"Jes, nur tiel oni povas nomi la grandan helpon, kiun donis al la malsana redaktorino de HdE, dum la pasinta Praga UK, internacia teamo de raportantoj.

Nia danko iras ankaŭ al la kelkpersona grupo de torinaj gejunuloj, sen kies helpo, antaŭe kaj poste, tiu-ĉi duobla numero ne estus povinta aperi!

Ada Fighiera-Sikorska"

Mesaĝoj el la tuta mondo

La doloro de la Esperanto-Movado estas granda. Okaze de ŝia morto alvenis centoj da kondolencaj mesaĝoj, kiuj bildigas la sentojn de la esperantistaro. Ni citas ĉi-sube nur kelkajn el ili:

"Ŝi ja estis kvazaŭ institucio" (Detlev Blanke)

"La manko de Ada dumkongrese (en Prago) efikas, kvazaŭ mankus la flago dum la inaŭguro" (Cristina de' Giorgi)

"Mia tuta familio kaj la tuta hispana esperantistaro havas grandan ŝuldon al Ada" (Augusto Casquero)

"Ada estis ia legendo, iu modelo por mi" (László Szilvási)

"Apenaŭ eblas imagi la Movadon sen ŝi" (Humphrey Tonkin).

"Heroldo" vivos!

En la lastaj tempoj, Ada esprimis la deziron rezigni pri la eldonado de la gazeto ek de la venonta jaro. En tiu senco, la 17-an de julio 1996 ŝi subskribis la assemblean protokolon de la senprofitcela asocio "Heroldo de Esperanto", laŭ kiu la eldonado de la gazeto ek de la 1-a de januaro 1997 transprenos la Kooperativo de Literatura Foiro tra sia itala filio, kun la kunlaboro de Gian Carlo Fighiera.

Ada volis tion persone anonci al la legantaro: tiucele, ŝi komencis verki en sia lito la suban lastan artikolon, kiun la morto interrompis:

"La rekorda kalendaro de "Heroldo" konfirmiĝis"

"La plej populara, internacia novaj-gazeto "Heroldo de Esperanto", fondita en aprilo 1920 de la germana esperantisto Teo Jung, fine de la nuna jaro ŝanĝos sian eldonanton. En la sama momento, rekorda eldon-tempo estos konfirmata, ĉar la ĝisnuna redaktorino, la 67-jara polino Ada Fighiera-Sikorska, edzino de la italo Gian Carlo Fighiera, redaktis la gazeton seninterrompe dum 36 jaroj, de januaro 1962 ĝis fino de 1996. Dum tiu periodo, ŝi tutsola prizorgis la aperon de la gazeto kaj ĝin administris, funkcianta kiel unupersona stabo.

Teo Jung havis grandajn meritojn por HdE, unue kiel ĝia patro kaj pro la decido daŭrigi la eldonon post la milito. Memorindas, ke dum la '30-aj jaroj li havis la kurraĝon rezisti al la naziaj persekutoj.

Verŝajne, nur unu sola internacia gazeto en Esperanto en 76 jaroj havis nur du redaktorojn..."

"Heroldo" plue vivos, kiel volis Ada. Ĝi plue gardos la demokratian kaj liberecan karakteron, kiu signis ĝin ek de 1920. Tio estas la plej taŭga monumento, kiun ni povas starigi al la memoro de Ada.

Heroldo de Esperanto, lege registrita societo sen profita celo.

ADA (1929 - 1996)

La Esperanto-Movado funebros pro la morto de Ada Fighiera-Sikorska, la redaktorino de "Heroldo" de 1962 ĝis 1996. Ada forpasis la 7-an de aŭgusto 1996, en la aĝo de 67 jaroj, en la Klinikon Fornaca (Torino), kie ŝi kuŝis dum du monatoj pro nekuraĉebla malsano ĉe vertebro kaj hepato. Ŝi ne konis la tipologion de la malsano kaj neniam suferis, danke al la kontraŭdoloraj terapioj al ŝi aplikataj. Ŝi estis flegata kaj asistata tagon kaj nokton seninterrompe.

Ĝis la fino ŝi restis optimisma, plene fidis al la kuracistoj, legis kaj intelektu aktivis. En sia lito ŝi skribis dekojn da leteroj al siaj parencoj kaj amikoj, fiksante rendezuojn en postaj datoj. Kelkajn tagojn antaŭ ol forpasi ŝi komencis verki la artikolon, kiun ni citas sur paĝo 2, kaj petis la presprovojn de la kongresa numero de HdE por enpaĝigi ilin.

La korpo estis vizitebla dum du tagoj en la mortoĉambro de la kliniko: multaj esperantistoj kaj membroj de la loka pola komunumo omaĝis ŝin. Nekrologo en Esperanto aperis en la dua plej grava nacia gazeto. En la ĉerko troviĝis la pola kaj Esperanta flagoj: ŝi surhavis ankaŭ la kongresan insignon de Prago. En la pasintaj monatoj, la mesaĝoj, telefonaj kaj skribaj, alvenis po centoj el la tuta mondo. Laŭ ŝia deziro, la korpo estis cindrigita. La cindroj restos ĉe la cindrigejo de la ĉefa tombejo de Torino, fako A2, loko 24.

Manifesto de Prago (81-a UK 1996) de la movado por la internacia lingvo Esperanto

Ni, anoj de la tutmonda movado por la progresigo de Esperanto, *direktas* ĉi tiun manifeston al ĉiuj registaroj, internaciaj organizaĵoj, kaj homoj de bona volo, *deklaras* nian intencon firmvole plu labori por la celoj ĉi tie esprimitaj, kaj *invitas* ĉiun unuopan organizaĵon kaj homon aliĝi al nia strebado.

Lanĉita en 1887 kiel projekto de helplingvo por internacia komunikado, kaj rapide evoluinta en vivoplenan, nuancoriĉan lingvon, Esperanto jam de pli ol jarcento funkcias por kunligi homojn trans lingvaj kaj kulturaj baroj. Intertempe la celoj de ĝiaj parolantoj ne perdis gravecon kaj aktualecon. Nek la tutmonda uzado de kelkaj naciaj lingvoj, nek progresoj en la komunikad-tekniko, nek la malkovro de novaj metodoj de lingvo-instruado verŝajne realigos jenajn principojn, kiujn ni konsideras esencaj por justa kaj efika lingva ordo.

1. Demokratio. Komunikado kiu tutvive privilegiu iujn homojn sed postulas de aliaj ke ili investu jarojn da penoj por atingi malpli altan gradon de kapablo, estas fundamente maldemokratia. Kvankam, kiel ĉiu lingvo, Esperanto ne estas perfekta, ĝi ege superas ĉiun rivalon en la sfero de egaleca tutmonda komunikado.

Ni asertas ke lingva malegaleco sekvigas komunikan malegalecon je ĉiuj niveloj, inkluzive de la internacia nivelo. Ni estas movado por demokratia komunikado.

2. Transnacia edukado. Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lerneĵano kiu studas la anglan lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano kiu studas Esperanton lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo.

Ni asertas ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

3. Pedagogia efikeco. Nur malgranda procentaĵo el tiuj kiuj studas fremdan lingvon, ekmastras ĝin. Plena posedo de Esperanto eblas eĉ per memstudado. Diversaj studoj raportis propedeŭtikajn efikojn al la lernado de aliaj lingvoj. Oni ankaŭ rekomendas Esperanton kiel kernan eron en kursoj por la lingva konsciigo de lernantoj.

Ni asertas ke la malfacileco de la etnaj lingvoj ĉiam prezentos obstaklon por multaj lernantoj, kiuj tamen profitus el la scio de dua lingvo. Ni estas movado por efika lingvoinstruado.

4. Plurlingveco. La Esperanto-komunumo estas unu el malmultaj mondkalaj lingvokomunumoj kies parolantoj estas senescepte du- aŭ plurlingvaj. Ĉiu komunumano akceptis la taskon lerni almenaŭ unu fremdan lingvon ĝis parola grado. Multokaze tio kondukas al la scio de kaj amo al pluraj lingvoj kaj ĝenerale al pli vasta persona horizonto.

Ni asertas ke la anoj de ĉiuj lingvoj, grandaj kaj malgrandaj, devus disponi pri reala ŝanco por alproprigi duan lingvon ĝis alta komunika nivelo. Ni estas movado por la provizo de tiu ŝanco.

5. Lingvaj rajtoj. La malegala disdivido de potenco inter la lingvoj estas recepto por konstanta lingva malsekureco, aŭ rekta lingva subpremado, ĉe granda parto de la monda loĝantaro. En la Esperanto-komunumo, la anoj de lingvoj grandaj kaj malgrandaj, oficialaj kaj neoficialaj, kunvenas sur neŭtrala tereno, dank' al la reciproka volo kompromisi. Tia ekvilibro inter lingvaj rajtoj kaj respondecoj liveras precedencan por evoluigi kaj pritaksi aliajn solvojn al la lingva malegaleco kaj lingvaj konfliktoj.

Ni asertas ke la vastaj potencodiferencoj inter la lingvoj subfosas la garantiojn, esprimitajn en tiom da internaciaj dokumentoj, de egaleca traktado sendistinge pri la lingvo. Ni estas movado por lingvaj rajtoj.

6. Lingva diverseco. La naciaj registaroj emas konsideri la grandan diversecon de lingvoj en la mondo kiel baron al komunikado kaj evoluigo. Por la Esperanto-komunumo, tamen, la lingva diverseco estas konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco. Ŝekve, ĉiu lingvo, kiel ĉiu vivajospicio, estas valora jam pro si mem kaj inda je protektado kaj subtenado.

Ni asertas ke la politiko de komunikado kaj evoluigo, se ĝi ne estas bazita sur respekto al kaj subteno de ĉiuj lingvoj, kondamnas al formorto la plimulton de la lingvoj de la mondo. Ni estas movado por lingva diverseco.

7. Homa emancipiĝo. Ĉiu lingvo liberigas kaj malliberigas siajn anojn, donante al ili la povon komuniki inter si, barante la komunikadon kun aliaj. Planita kiel universala komunikilo, Esperanto estas unu el la grandaj funkciaj projektoj de la homa emancipiĝo — projekto por ebligi al ĉiu homo partopreni kiel individuo en la homara komunumo, kun firmaj radikoj ĉe sia loka kultura kaj lingva identeco, sed ne limigite de ili.

Ni asertas ke la ekskluziva uzado de naciaj lingvoj neeviteble starigas barojn al la liberecoj de sinesprimado, komunikado kaj asociiĝo. Ni estas movado por la homa emancipiĝo.